

# Temo: La Infanaĝo

Esperanto-Lingva Konversacia Rondo de Losanĝeleso

27 julio 2003

## 1 Demandoj

Pro tio, ke mi ne povos partopreni la venontan kunvenon de la rondo, jen mi donas al vi ĉiujn demandojn, kiujn mi elpensis ĝis nun pri la temo *la infanaĝo*:

- a. Ĉu vi konsideras vian propran infanaĝon feliĉa aŭ malfeliĉa?
- b. Kiuj punmanieroj estas taŭgaj por infanoj? Kiuj rekompensmanieroj? Kio estas via propra filozofio koncerne la manieron de instrui al la infanoj la bonan konduton kaj la sukceson en la vivo?
- c. Kiuj estas la plej gravaj danĝeroj por la infanoj nuntempe en nia lando?
- ĉ. Kiuj estas la tipaj (aŭ kliŝaj) okupoj de junaj knaboj? De junaj knabinoj? Ĉu vi mem multe interesiĝis pri la tipaj okupaj de viaj samseksanoj dum via infanaĝo?
- d. Kion oni atendas de knabino, ke ŝi lernu antaŭ sia plenkreskiĝo? De knabo? Kiom ŝanĝis tiu situacio dum la ĉi-lastata generacio?
- e. Laŭ via opinio, kio estas pli agrabla aŭ dezirinda en la vivo de la infanoj de hodiaŭ ol dum via propra infanaĝo? Kaj kio nun estas malpli agrabla aŭ malpli dezirinda por infanoj ol en la pasinteco?
- f. Laŭ vi, kio estas la plej grava afero, kiun vi nun komprenas, sed kiun vi ankoraŭ ne komprenis kiam vi estis infano?
- g. Kiom estas la ideala de nombro de infanoj en unu familio? Ĉu vi iam sentis, kiam infano, ke vi havas tro da gefratoj kaj tial ne ĝuas sufiĉe da atento fare de la gepatroj? Aŭ male, ĉu vi iam sentis vin soleca, ĉar vi ne havas sufiĉe da gefratoj?
- ĝ. Kiuj estas la kialoj, pro kiuj la plenkreskuloj decidas ekhavi infanojn?
- h. Ĉu dum via infanaĝo vi havis iun grandan revon por via estonteco? Kiom similas aŭ malsimilas via aktuala<sup>1</sup> vivo al viaj tiamaj revoj?
- ĥ. Imagu, ke eksterlandano ne komprenas la esprimon « baby shower ». Ekspliku kion ĝi signifas kaj kio kutime okazas dum tia « shower ».

---

<sup>1</sup>Ne forgesu, ke *aktuala* signifas « nuntempa » (angle *present*). Ĝi ne signifas « reala » aŭ « vera ».

## 2 Utilaj Vortoj

Ĉi-sube vi trovos kelkajn utilajn vortojn, kiuj povus esti utilaj por diskuti la infanaĝon. Por trovi tiujn vortojn kaj kontroli ilian ĝustan uzmanieron, mi konsultis precipe kvar vortarojn—*Hejma Vortaro* (1999) red. Lindstedt, *Praktika Bildvortaro de Esperanto* (1979) de Oxford University Press, *Plena Ilustrita Vortaro* (1987) de SAT, kaj *Comprehensive English-Esperanto Dictionary* (1995) de Benson.

### 2.1 Ĝeneralaj Konceptoj

**konduiti bone/malbone** behave oneself (well, poorly)

**matura** mature

**respondeco** a responsibility

**puni** to punish

**rekompensi** to reward

**tasketoj** chores

**adoleski** to be an adolescent

**adoleskanto** an adolescent

**rendevuado** dating

**plenaĝulo, plenkreskulo**

### 2.2 La Lernejo

**infanĝardeno** a kindergarten

**bazlernejo, elementa lernejo** an elementary school

**mezlernejo**

**altlernejo, gimnazio, liceo** a high school

**noto** a grade (score one gets on a test, for example)

**klaso** a grade (year of a program of study, such as « first grade »)

### 2.3 La Ludado

**pupo** a doll

**grimpi** climb

**saltŝnuro** a jump rope

**salti ŝnuron** to jump rope

**sablujo, sablokesto**

**dorlotbesto, hejmbesto**

## 2.4 La Beboj

**naski** to give birth

**graveda** pregnant

**rukti, ruktigi** to burp (What do you think the difference is between these two words?)

**feto** a fetus

**kradlito** crib

**nutrobotelo** baby bottle

**suĉi** to suck

**suĉinfano** = bebo

## 3 Ekzerco

La ĉi-subajn difinojn mi trovis en la *Hejma Vortaro* kaj en PIV. Kiel vi tradukus ĉi tiujn vortojn en la anglan? Kelkaj el la vortoj eble ne havas ekzaktan anglan tradukon. Mi sugestas, ke vi diskutu ĉi tiujn vortojn dum la kunveno.

**pendolilo** Speco de balancilo: tabulo pendanta de ŝnuroj aŭ ĉenoj.

**baskulo** Speco de balancilo: longa tabulo metita sur kuŝantan ŝtipon aŭ alian subtenilon, tiel ke unu persono ĉe ĉiu ekstremaĵo povas alterne leviĝi kaj malleviĝi.

**balancilo** Tabulo, sur kiu oni povas lude balanciĝi (pendolilo aŭ baskulo).

**suĉumo** Kaŭĉuka (aŭ ekzemple silikona) pli-malpli cicoforma aĵo, kiun oni donas al bebo, po ke ĝi trankviliĝu suĉante ĝin.

**kradlito** Bebolito, kie la infanon protektas altaj flankoj el krado, kutime ligna.

**kaŝludo** Ludo, kie sin kaŝas ĉiuj krom unu, kiu post prokrasta nombrado klopodas trovi la aliajn.

**dorloti** Agi kun iu tro koreseme kaj tro indulge. Rimarku la proverbon: Kiu volas panon, ne dorlotu la manon!

**petoli** 1. Uzi sian troon da energio en sencelaj, viglaj sendisciplinaj movoj: *la hundeto petolis ĉirkaŭ liaj kruroj* 2. Agadi ŝerce, sendiscipline, senkonsidere, kontraŭ la reguloj de bonkonduco: *dume la frato petolas sur la stratoj kaj eble baldaŭ fariĝos ŝtelisto*. Rimarku la Zamenhofan proverbon: Petolu, diboĉu, sed poste sorton ne riproĉu. Rimarku ankaŭ la vorton *dorlotbesto*, kiu signifas *hejmbesto*.

**vindi** 1. Ĉirkaŭvolvi suĉinfanon per tuko. 2. Ĉirkaŭvolvi ian korpoparton por kuraci, senmovigi, senfunkciigi aŭ sendaĝerigi ĝin: *vindi vunditan brakon, vindi al iu la okulojn*. Koncerne la unuan sencon, la tuko, per kiu oni vindas bebon nomiĝas aŭ *vindotuko* aŭ *vindaĵo*.

**bubo** 1. Seneduka, petola knabo. 2. Infanmensa, krudgesta homo.

## 4 Kelkaj Lingvaj Rimarkoj

**Lernanto kaj studento.** Laŭ PIV, studento estas « persono, studanta ĉe universitato aŭ alia simila teknika supera lernejo ». Do, infana lernejo estas ne studento, sed lernanto.

**Gimnazio kaj gimnastikejo.** Gimnazio estas altlernejo. Oni traduku la anglan vorton *gymnasium* per *gimnastikejo*.

**Adulti kaj adulto.** *Adulti* signifas « rompi la geedzan fidelecon ». *Adulto* estas « Estaĵo, kiu atingis sian plendreskan, definitivan formon », t.e. « plenkreskulo »..